

GUSTIGO

Estimata Sinjoro Redaktoro,

Antaŭ ne longe vi publikigis artikolon (Sc. R. 1 83) de s-ro Howard Hulme, en kiu la aŭtoro iom longe aludas al mi kaj mia laboro, kaj en kiu troviĝas gravaj eraroj.

En la intereso de scienca precizeco mi devas peti vin, publikigi la ĉi-subajn korektojn. Estas bedaŭrinde ke mia malnova amiko havis iajn miskomprenojn kiam li verkis la artikolon (La Komuneco de la Sciencoj).

Unue, mia Universitato (Birmingham) neniam aljuĝis al mi Doktorecon, sed mi ricevis la Licenciatacon en Scienco, laŭ Oficialaj Reguloj, pro tezo matematika.

Due, mi estis Prezidanto de la Metalurgia Societo de Birmingham dum 1940, sed de tiu tempo min sekvis pluraj aliaj Prezidantoj.

Trie, mi neniam estis studento de la „Reĝa Kolegio de Scienco kaj Arto” en Londono, sed s-ro Hulme kaj mi interkoniĝis kiel studentoj en la Artlernejo en Shrewsbury antaŭ ĉirkaŭ 55 jaroj.

Kvare, oni erare atribuis al mi la inventon kaj montradon de aparato por demonstro de la internaj streĉoj k.t.p. en materialoj, antaŭ la Brita Asocio por la Antaŭenigo de Scienco. Mi ne inventis tian aparaton, sekve mi ne povus ĝin montradi. Miaj demonstroj antaŭ la nomita Asocio temis pri „La Sfero Libera Pendolo” kaj „La Geometrio de la Superspaco”.

La aliaj aludoj pri mia laboro ŝajnas preskaŭ korektaj. Mi faris sufiĉe da laboro pri vibro-fiziko, precipe la bela desegno kiu estas uzebla por estontaj celoj en tiom da manieroj, kaj dum mia kariero de Esplorada Asistanto en Universitato mi okupis min pri multaj modernaj evoluadoj. Tamen mi opinias ke ne konformas al la Scienca Spirito akcepti honoron por laboro kiun fakte oni ne faris.

Cyril H. H. Franklin

Estimata Redaktoro,

413.161

NEOLIGISMOJ EN „SCIENCA REVUO”

Mi forte kontraŭstaras la proponon de S-ro Curt Dellian (Sc. R. 1 125) ke oni enkonduku radikon POTENCI kun signifo „laboro en unu tempunu”.

Ni jam havas radikon POTENC en la komuna vortaro kaj teknikan radikon POTENCIAL kun precize difinita signifo. Nova radiko POTENCI (false internacia laŭ formo kaj similanta nur unu ĉeflingvan vorton havantan la proponitan signifon) povas naski nur konfuzon kun la jam akceptitaj similaj radikoj.

Tamen la afero ne estas tre facila. La koncerna koncepto estas ofta en fiziko kaj inĝenierarto kaj ĝi bezonas simplan terminon. Oni jam foje uzis

„povo”, kaj en kuniĝo „ĉevalpovo” ŝajnas esti jam akceptita kiel nomo de unu unuo de laboro/tempo, sed oni sentas, ke tiu vorto, kun diversaj rilataj signifoj en la komuna lingvo, iel ne taŭgas.

Mi proponas, ke ni uzu eksperimente la vorton „povumo”; tio estas regule formita esperanta vorto ankoraŭ sen difinita signifo, kaj neniel konfuza. Ekz. „La povumo de la motoro estas 2 kilovatoj”; „La elektrocentralo ne havas sufiĉe da povumo por lumigi samtempe ĉiujn lampojn de la urbo.”

Pri RADIUS mi konsentas, ke ĝi estas necesa, internacia kaj senkonfuza, sed DEFEKT, por unu speciala speco de manko ŝajnas nenecesa ankaŭ konfuza por angloj pro la malsama signifo de la tre ofta komunvortara vorto „defect” en la angla lingvo (Mi ja scias, ke oni diras angle „defect of mass” — ne „defect” solestara — en la teknika senco). En Esperanto „maso-manko” diras ĝuste tion, kion oni volas diri, ne povas esti miskomprenata kaj ne bezonigas novan radikon.

C. M. Houghton (Anglujo)

Ankaŭ aliaj bonvolu esprimi sian opinion.

019.941

RECENZOJ KAJ PRINOMENKLATURAJ RIMARKOJ

(048.1)

001.4

408.92(075.4) = 393

G. F. Makkink: *Esperanto leren lezen*. Eldonis: J. Muusses, Purmerend, Nederlando. Formato: 135×192 mm², 56 paĝoj. Prezo 1.— ned. guldeno. — Ĉi tiu libreto, kiu estas dediĉita al la nederlandaj intelektuloj, celas ebligi al ili, kiuj scipovas almenaŭ legi la germanan, anglan kaj francan lingvojn, kaj kelkfoje iom la latinan kaj grekan, lerni legi Esperanton kun kiel eble plej malmulte da peno. Ja la signifon de la radikoj oni sufiĉe facile divenas. Oni devas scii ion pri la gramatiko, pri la afiksoj, pri la korelativoj, ktp.

La aŭtoro uzas la konatan leteron al Borovko pri la estiĝo de Esperanto kiel materialon. En la larĝa marĝeno troviĝas la novaj vortoj kun iliaj tradukoj. Alternas partoj de la letero kun klarigoj de la aŭtoro. Ĉi tiuj klarigoj temas pri: ortografio kaj prononco; finaĵoj; artikolo; prefiksoj; sufiksoj; korelativoj; la sufikso -iĝ-; nerekta cito; direktoindika n; objekta n; kaj participoj. En postparolo 5-paĝa la aŭtoro donas ĉiajn utilajn informojn precipe pri ebloj de aplikado de Esperanto kaj provas konvinki la leganton ke utilas lerni la lingvon pli funde. En alaĵo li informas pri kelkaj esperantistaj organizaĵoj kaj pri kelkaj lernolibroj kaj vortaroj, ktp. Finas la libron tabeloj de sufiksoj, korelativoj, participoj, finaĵoj, pronomoj, numeraloj, prononco, prefiksoj. Aldonindaj estus: tabeloj de prepozicioj, kaj de certaj konjunkcioj, partikloj kaj adverboj. Mi kredas ke ĉi tiu libreto meritas tradukon en aliajn lingvojn. Nederlandaj samideanoj varbu per ĝi inter nederlandaj intelektuloj! Gratulon al aŭtoro kaj eldonisto pro ĉi tiu tre taŭga libreto.

W. P. R.